FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA · H E F

Año II (N.° 18)

BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPERANTISTA ESPAÑOLA

Núm. 6

JUNIO 1950

Ruzafa, 7
VALENCIA
(ESPAÑA)

IDEALISMO PRACTICO

La característica de las generaciones de la postguerra es el materialismo crudo y soez. que aparta con desdén, cuando no con brutalidad, todo aquello que no conduzca en breve plazo a la obtención de un beneficio tangible y evidente.

Por eso, ahora, se observa con pena la desaparición o, por lo menos, el estado miserioso de muchas doctrinas, romanticismos o ideologías puramente especulativas, y, en la vida cotidiana, el fracaso de todas aquellas actividades que, dando solaz al espíritu y expansión al pensamiento, no aportan incremento alguno a la cuenta corriente o, más modestamente, al presupuesto casero.

Por eso, resultaría ingenuo pretender que el movimiento esperantista, henchido de filantropía, con un contenido de promesas fraternales, anuladoras del actual confusionismo lingüístico, pudiera escapar a la regla general.

En vano se esfuerzan algunos elementos disgregantes en achacar la lentitud expansiva del Esperanto a supuestas imperfecciones idiomáticas. La marcha lenta, pero segura, hacia la adopción mundial de nuestro idioma, como lengua auxiliar, adquirirá notable impulso, cuando individuos y autoridades se den cuenta de que, además de su contenido romántico, como teoría de un ideal de comprensión espiritual, el Esperanto es **ya**, en el momento presente, un idioma claro, sencillo y armonioso, mediante el cual, los que lo hablan, los que lo poseen, gozan en su totalidad de las siguientes realizaciones prácticas:

1.° Tener la **seguridad** de poseer un idioma aparte del propio de cada uno.

2.° Posibilitar el establecimiento de una verdadera y amistosa comprensión con personas que radican en los más lejanos y diversos paises.

3.° Alcanzar, con un esfuerzo mínimo, un beneficio máximo, en relación a otros idiomas extranjeros, ya que los que pueden comprender el Esperanto están extendidos por el mundo entero, y no se limitan a entender a los que entienden este idioma, sinó que además los atienden cumplidamente por correspondencia, o los reciben alborozados, durante su estancia en el pais, con motivo de cualquier viaje por asuntos de negocios o por mero placer, recreo y turismo.

El más modesto esperantista se ve agasajado y atendido, no con la fria cortesía de un hotel, de categoria y rango más o menos elevado, sinó con la grata jovialidad de un hogar de cercanos familiares.

Esta es la faceta más interesante del idealismo esperantista, que sabe aunar el concepto filosófico de la hermandad universal, con la realización práctica de este mismo concepto: la franca hospitalidad, el rápido servicio, el positivo beneficio de un informe, de una traducción, de un simple intercambio postal, aunque solo sea por la inocente vanidad de poder enseñar a nuestros conocidos una variada colección de sobres, dirigidos a nuestro nombre, adornados con el exotismo de los sellos de correo de algunos paises apartados de las rutas corrientes. Vanidad que deja de ser vanidad, y deja de ser inocente, si se trata de expertos y entendidos filatelistas...

Y estas son las deducciones utilitarias de un ideal, que, en escala cada vez mayor, va conquistando, junto a soñadores idealistas, a mucha gente de la que se deja convencer, no por sueños sinó tan solo por consideraciones prácticas y positivas.

FACETAS DEL MOVIMIENTO ESPERANTISTA

● ALEMANIA.—Se ha editado en Esperanto un folleto turístico de Konstanz, el cual puede recibirse gratuíto de «Stadt Verkehrsamt».

La Comisión de las Representaciones de la Semana de la Pasión, de Oberammergau ha editado en Esperanto «Gvidilo Oberammergau kaj Ethal» para difundir internacionalmente tales representaciones sacras. Puede solicitarse contra un cupón respuesta de «Geschaftsstelle der Passionsspiele» (Oberammergau-Baviera). Sería interesante que las representaciones sacras de Olesa siguiesen el ejemplo en España, para la propaganda exterior.

● AUSTRIA.—En la Universidad y en la Escuela Técnica de Graz se han establecido aulas de Esperanto, con gran número de asistentes.

● AUSTRALIA.—Con ocasión del VII Congreso Esperantista, celebrado en Melbourne, los tres más importantes diarios de la ciudad publicaron once artículos sobre el Esperanto; cuatro estaciones radiaron cinco charlas e intervius, y la estación oficial Radio-Australia en su emisión para Europa, invitó a los congresistas a saludar a los esperantistas europeos.

● BRASIL.—El XII Congreso Brasileño de Esperanto, celebrado en Belo Horizonte, tuvo una subvención especial de la Asamblea Legislativa después que la Comisión Organizadora había recibido otra del Gobierno Local. Dicho Congreso fué inaugurado por los Excmos. Sres. Gobernador del Estado y Ministro de Educación, cuyos discursos fueron transmitidos por las emisoras de radio oficiales.

● CANADA.—En los boletines interiores de dos importantes empresas comerciales han aparecido artículos sobre Esperanto. Se trata de «Westinghouse News», de Hamilton (Ontario), y «Spanner», de la Canadian Pacific, la conocida compañía ferroviaria, que de este modo aumenta su prestigio.

● ESTADOS UNIDOS.—«The Witness», de Dubuque (Iowa), y «Catholic School Journal», de Milwaukee, publican artículos sobre Esperanto.

● FRANCIA.—«UNESCO» (19, Avenue Kléber, PARIS) XVL) ha publicado «Summary Report of the International Conference on Adult Educatión» celebrada en Elsinore (Dinamarca); en este folleto también se aprecia el tema lingüístico en párrafos como los siguientes: «el mayor obstáculo para la colaboración internacional en el campo de la educación es el de la diversidad de lenguas».

● HOLANDA.—La Junta General de la Sociedad Química Holandesa (Lange Voohront, 5 — La Haya) aceptó una noción propuesta por 50 miembros, pidiendo que sus revistas «Recueil des Traveux Chimiques des Pays-Bas» y «Chimishc Weekblad» contengan resúmenes en Esperanto.

La organización «El Esperanto en la enseñanza» prepara un curso del idioma auxiliar, dedicado a los maestros, y el cual tendrá lugar en Havelte (Drente) este verano.

La Asociación de Profesores de las Escuelas Superiores, en su sesión anual, ha adoptado la resolución de recomendar el Esperanto como base fácil para el estudio de las lenguas vivas.

● ISLANDIA.—La Federación de Cooperativas ha introducido el Esperanto en sus estudios por correspondencia, que concede a los asociados.

● INGLATERRA.—«Pioneer News» y «The Socialist Leader» son periódicos ingleses que ya publican secciones en Esperanto.

«British European Airways» organiza una exposición ambulante de propaganda a través de Dinamarca, Alemania, Austria, Italia, Suiza, Francia y Bélgica, en la que también se empleará el Esperanto.

El Presidente de la Sociedad Británica de Maestros Esperantistas, señor George Moir, indicó en la Junta Anual de la Sociedad, que el Esperanto ha sido enseñado durante 1949 en 22 escuelas con asistencia entusiasta de 1.542 escolares.

● ITALIA.—«Giornale di Clínica Médica» (Doctor Domenico Campanecci Universidad de Parma) publica artículos con resumen de Esperanto; y, a petición de las personas interesadas, remite la traducción íntegra del artículo que se desea conocer. Nuestro idioma goza ya de un merecido prestigio.

POR PLI PLANA LITERATURADO

PENSOJ POST LEGO DE FRAGMENTA KLASIKAĴO

Grandĝue mi ĵus legis tradukspecimenon de «Don Kiĥoto», kaj tuj mi sentas emon komplimenti la interpretiston. Vere, li sukcesis ne nur ridigi kaj ploretigi sian leganton, sed li vekis mian apetiton ripeti legadon de la tuta klasika verko, legita danlingve iam en bubaj jaroj.

Ankoraŭfoje mi, do, vagis kun la kavaliro de la Malgaja Figuro tutcerte pli kunsente, detalkomprene, ol pli frue. Ĉion mi englutis frande.

Koran dankon!

Kelkfoje oni povas miri, kial ne delonge aperis en Esperanto la plena genia verko de Cervantes. Kial?

Ĉu ne troe mankas sistemo en tradukado kaj eldonado de nia esperante vestita literaturo? Sajne oni elsendas la bindojn pluvgute, anstataŭ irigacie. Nur en kelkaj unuopaj landoj, oni klopodis konscie aperigi nur vere impresajn kaj dignajn verkojn en nia lingvo, sed plejloke oni ambicias elsendi nur povrajn pamfletojn, duarangajn, mizerajn broŝurojn aŭ efemerajn flugfoliojn.—Bona vojo por pli potenca agado povas esti fondo de efektivaj eldon-kooperativoj.

Ekzemple, en mia lando apenaŭ deko da verkoj el ĝia kelkmilbinda literaturo aperis esperantlingve; kaj, escepte de Fabeloj de H. C. Andersen, tute mankas klasikajoj. Mi supozas, ke simile plorinde estas aliloke.—Humilige por ni estas, ke la fabelojn tradukis neniu dano, sed Zamenhof. Komprenu bone, mi ne riproĉas al Zamenhof, lia lingvaĵo kompreneble estas plej modela, sed... li ne sciis la danan kaj tial tradukis el la germana. Multloke tial la fabeloj perdis sian especife danan aromon, kiel ĉiuj tradukoj perdas. Sed duoble perdas la tro oftaj retradukoj. Ili estas nepre evitindaj!

Por akceli pli planan eldonadon de literaturo, mi proponas, ke oni en ĉiu lando delegas al kelkaj kompetentuloj — esperantistoj aŭ ne, tutegale — por ellabori literatur - indekson, t. e. listo kun la plej karakterizaj verkoj aŭ fragmentoj el la klasika kaj moderna literaturoj de la koncerna lando. Tiel, per si men, ankaŭ ekestas la kadroj de *Antologio*, kiun devus aperigi la esperantistaro de ĉiu lando. Samtemple pli bone eblos eviti, ke pluraj tempoperde tradukas samajn verkojn.

Oni lasu nur al plej altkvalitaj tradukantoj la interpretadon; kaj, antaŭ presigo, oni havu la manuskriptojn kontrolitaj de almenaŭ unu eksterlanda lingva kaj literatura kompetentulo. Modelo por tia kontrolado estas la Literatura Komitato, kiu jam multjare funkcias en Nederlando. Certe, eblas havigi ties raportojn kaj regularojn.

La eldonejoj respektu la laboron de la literaturaj komitatoj, ne ignori. sed mendi tradukojn laŭ la oficiala literatur-indekso. Ne okaze nek egoiste oni elektu eldonotâjon nurprofite, sed konscie kaj laŭ la interesoj de la tuta esp-movado, kaj kun deca respekto antaŭ la nacia literaturo. Nur tiel ni atingos indan traduk-literaturon en nia lingvo Esperanto.

Plej laste oni nepre solvu tiun ĉi problemon dum la Pariza kongreso. Kaj se ne tie, tamen ie, iel, iam... egale, se nur plej baldaŭ!

POUL THORSEN - Kopenhago

INTER LA PROZO

La tago, en kontrasto kun la nokto, estas nun ĉe la kulmino de sia plej longa daŭro. Tra la spaco, kiu vastiĝas ekde la rozaj strioj de gaja kaj frua, tre frua, matena vekiĝo, ĝis la opaloj de milda kaj ege malfrua vespera krepusko, la lumo, en plena apogeo de hela regado, persekutante rampaĵojn el ombro, ludas kaj jonglas per akraj tonoj aŭ per variaj reflektoj; ĉar la suno, per la brulantaj kloriloj de sia flama paletro, ŝminkas la vizaĝon de la ĉielo, sur majesta arko de briloj kaj rebriloj, Ĉio en la naturo estas nun sub la varma signo de la lumo, sub imperio de la tago; sed, ĝuste pro tio, la mallonga daŭro de la nokto, devigata koncentriĝi inter reduktitaj limoj, fariĝas pli ĉarma, pli loga, pli riĉa en la esenco de ĉiuj siaj kvalitoj, kvazaŭ ekstrakto de luksa parfumo, kiu estas ja des pli kara, des pli avide dezirata, ju pli eta la flakono... Tial, dum efemera paŭzo, kiam ripozas la lumo, ankaŭ ripozas la okuloj, liberaj je vitraj ŝirmiloj, pro la ekstazo de kvietaj rigardoj, en ideala promeno, al la nigra veluro de serena nokto, garnita per miliardoj da briliantoj, kies disradietoj neniel pretendas konkurenci, sed nur harmonii, kun la vivaj lampetoj de multenombraj surteraj lampiroj, por taŭga aranĝo de la sorĉa iluminado de tiu kermeso plej mirinda, kiu okazas en la paco de kamparo kaj arbaro, kaj kiun povas partopreni ĉiuj homoj, kiuj ŝatas la nokton ne ja nur por dormi, sed ankaŭ por songi kaj revi!

Mi parolas, cetere, laŭ tia maniero, pro natura emo malkovri miajn intimajn pensojn pri la zorgoj de multaj homoj, kiuj freneze kaj vane serĉas feliĉon ekster la superaj regionoj de noblaj aspiroj al bono kaj belo Tamen... revado sen dormo estus negativa ago; tion sperte mi scias, ĉar sen la lumo de la tago, mi ne povus jam legi la dikan staplon da tiuj gazetoj pri kiuj ĵus mi skribis koncizajn komentojn, kaj kiuj jen estas tutkore al vi dediĉitaj:

Kiel ĉiam, mi ŝatas komenci per novaj titoloj. DIA REGNO estas la nomo de bela gazeto, organo de Kristana Esperantista Ligo Internacia, kun sidejo en Svedio. Per klara preso, sur tre bona papero, sekvas unu post alia interesaj artikoloj, inspiritaj versoj kaj eĉ trafaj lingvaj klarigoj. Agrabla kaj vigla, kvazaŭ raporto el granda ĵurnalo, estas longa priskribo pri la religia vivo en la nova ŝtato Izraelo; jena frazo lakone resumas la tutan raporton: «Sabato, en Izraelo, signifas *plenan trankvilon*». SEK estas zorge hektografita aldonaĵo de Studenta Esperanto-Klubo el Kopenhago; kun deziroj starigi kontakton, por interŝanĝi informojn kun studentaj Esperanto-Kluboj ĉie en la mondo. Oni raportas pri la jusa fondo de Esperanto-Federacio de danaj altlernejanoj, kiuj post lasta ĝeneralkunveno, vizitis faman kopenhagan amuzejon, kie ili tre bone amuziĝis... Tio kongruas plej trafe kun mia antaŭe dirita opinio pri faktoj kaj revoj. Sekvas en la vico NEW ZEALAND ESPERANTIST, gaja kaj simpatia bulteno de niaj geamikoj el Nova Zelando; mi ne scias, ĉu nur hazarde troviĝas frontpaĝe, kiel ornama vinjeto, esperanta stelo kun aldono de du flugpretaj flugiloj. En aparta anguleto ĝoje oni vidas aludon pri nia Bulteno, kio pruvas ke nia hispana voĉo venas ĝis la antipodo. LA RONDO denove nin salutas de la malproksima Aŭstralio; en artikoleto pri la supersignoj, oni diras: «En du artikoloj, oni kalkulis la ĉapelhavajn. El 4800 literoj, nur 102 havis supersignojn; do, proksimume 2% certe estas, ke se oni povas maŝinskribi anglan tekston en 58 minutoj, oni povus same skribi esperantan en 60». La gazeto sin ornamas per du belaj fotaĵoj, kun allogaj bildoj, pri la 7.ª Aŭstralia Esperanto-Kongreso; pro la granda nombro da ĉeestantoj, kaj ilia simpatia aspekto, klare oni vidas, ke nia movado, en tiel foraj latitudoj, estas gvidata de lertaj manoj kaj fervoraj koroj. AMERIKA ESPERANTISTO, serioza kaj grava, kiel kutime, pledas por nia lingvo sur la alta tribuno de Usono; konkretaj konkludoj kaj klaraj rezonoj, en angla lingvo, daŭre insistas kaj lerte uzas ĉiujn oportunajn ŝancojn, por ĝuste altigi la rangon de Esperanto, tie mem, en la lando, kie la reklamado estas arto, kaj efika rimedo, en ĉiuspecaj aferoj. Bonega estas artikolo de Sro. Solzbacher, sub titolo «Interna Ideo kaj Neŭtraleco»; ĉar ĝia enhavo meritas disvastigon, mi pinĉas kaj prenas kelkajn fragmentojn: «Laŭ mia opinio, tre malmultaj esperantistoj dubas, ke nia movado havas ne nur praktikan utilecon, sed ankaŭ idean valoron». «La Esperanto-movado disvastigas la uzon de Esperanto en la mondo; sed nur la uzon por honestaj celoj. Se bando de ŝte-

)E LA ESPERANTISTA GAZETARO

listoj, opio-kontrabandistoj aŭ aliaj krimuloj, uzus nian lingvon, la neŭtrala movado tute ne estus devigata esprimi ĝojon pri tio aŭ proponi helpon». «La speciala tasko de nia movado ne estas, do, paroli en ĝeneralaj kaj malprecizaj vortoj pri *paco* kaj *frateco*, sed montri konkrete la necesecon de interlingvo kaj la utilecon de Esperanto, ne nur en la estonteco, kiam ĝi estos uzata universale, sed jam en la nuna tempo». «Se ni ĉiuj konsentas pri la celo de paco kaj frateco, ni tamen povas havi malsamajn opiniojn pri la plej bonaj *metodoj* por realigi la pacon, pri la rolo de diversaj ideologioj kaj ekonomiaj principoj. La neŭtrala movado devas respekti la rajton de ĉiu membro, havi sian propran opinion pri tiaj problemoj. Speciale singarda ĝi devas esti kiam temas pri religio kaj politikaj partioj». «Neŭtraleco, en tiu senco, ne signifas, ke ni devas silenti pri la uzo de Esperanto por politikaj kaj religiaj celoj. Estas necese distingi inter objektivaj *informoj*, pri tia uzo, kaj *propagando* por la koncernaj organizoj». «Neŭtraleco ne postulas, ke Esperanto-gazeto neniam publikigu ion, pri kio kelkaj legantoj povas malkonsenti. Gazeto kiu malplaĉas al neniu kaj neniam provokas malkonsenton aŭ kritikon, estas teda kaj enuiga gazeto. Gazetoj de la neŭtrala movado devas konsideri siajn legantojn, kiel maturajn personojn, kiuj estas kapablaj kompreni kaj toleri diversajn opiniojn, se ili ne estas esprimataj en insulta maniero». Jen do klara leciono por vera kaj pozitiva konkordo interne de niaj vicoj. Oportune estas nun fari mencion pri LA DHARMO, sobra religia gazeto, kiu verve diskonigas, inter la esperantistoj, la principojn de pura Budhismo.

LA VOKANTO estas la brava titolo de intelekta gazeto, kiun redaktas nia senlaca samideano Ŝalom Zamir en Tel-Aviv, ĉefurbo de la juna izraela ŝtato. Densa, tre densa, estas la teksto, verŝajne tiel densa, kiel mia hodiaŭa kroniko. Vere legindaj estas kelkaj artikoloj, kies intelekta stilo ne estas ĝeno por facila kaj agrabla legado; jen eta specimeno: «La homo devas strebi eduki kaj evoluigi sin, dum tuta sia vivo, celante al la perfekteco, por absolutaj boneco kaj beleco; sed neniam la homo strebu aliigi sin laŭ la plaĉo de iu aŭ io, celante ties simpation aŭ favoron. La homo devas esti sufiĉe forta tiagrade, ke li povu diri simple kaj sincere: *Tia mi estas, kia mi estas!*» SCIENCIA REVUO represas la artikolon, kiun pri la kloromicetino verkis D-ro Tudela por nia Bulteno; ĉi tiu grava raporto aperas nun en adekvata medio, kun pliaj detaloj kaj oportunaj notoj. Ankaŭ mi scias pri la sukcesa resono, kiun trovis eksterlande alia studo pri la astmo, kiun verkis D-ro Herrero, ankaŭ en nia Bulteno; ambaŭ amikoj plene meritas la dankemon de la tutmonda esperantistaro, pro la utila apliko de nia lingvo por diskonigi la lastajn sciencajn eltrovojn je la servo de ĉiuj samideanoj.

LA GUSTA VOJO varme kaj entuziasme, sub la signo de la kruco, okupas dignan lokon en nia movado, kiel bonega cirkulero por la katolikaj esperantistoj. SVENSKA ESPERANTO-TIDNINGEN estas kvazaŭ albumo pri la societa esperantista vivo; nur pro tio, se ne jam pro bona cetera enhavo, ĝi estas treege utila informilo ĉe la manoj de ĉiu aktiva uzanto de Esperanto.

Antaŭ ol meti finan punkton, decas specialaj salutoj al MALGRANDA REVUO, vera juvelo kaj, verŝajne, unusola literatura gazeto nun aperanta. Tra la densa teksto kaj bona enhavo, en ĝia lasta numero, estas aparte interesaj por ni du pecoj: la majstra, kvankam ne plene favora, recenzo de mia amiko J. Regulo Perez pri la eldonita fragmento de «Don-Kiĥoto», kaj la komentoj de Sro. Stellan Engholm pri kelkaj pikemaj aludoj, en nia Bulteno, favoraj por la represo de artikoloj. Sro. Engholm, per ĝentilaj vortoj, kontraŭdiras nian opinion kaj defendas siajn vidpunktojn, kiujn cetere mi konsideras plej bonintencaj. Sciu nia estimata samideano, ke lia laboro havas nur sincerajn admirantojn!.

Finiĝas la papero, finiĝas la tago kaj finiĝas, sekve, la natura lumo por plua legado kaj plua skribado. Mi lasas fali la manojn, ĉar mi estas laca, sed kontenta, pro la plenumita tasko.. Kelkaj steloj per siaj arĝentaj radioj, jam sukcesis fendi la vualojn de milda krepusko; la ombroj invadas la arbaron, ne kiel timigaj fantomoj, sed nur kiel promeso de dolĉa ripozo por la delikataj nervoj de via fidela servanto, ĉiam preta, se necese, por denove tuj reagi

LA LEGEMA KOBOLDETO

KIAL MI AMAS ESPERANTON

Mi volas tutmondan pacon.

Ne tiun, kiu trompeme loĝas ĉe la buŝo de multaj, sed tiun, kiu senteme vivas en niaj menso kaj koro.

Mi fieras hodiaŭ, kiam du estintaj kaj unu estonta militoj terure nin pravigas esti esperantistoj kaj pacemuloj, kunigi dorlote la du ideojn, klopodante, kvankan vane, sekvi la altajn ekzemplojn de nia Majstro, deklari tion ĉi publike por ke la estonto ŝparu mian nomon, kiam ĝi eventuale parolos pri nia pli ol sovaĝa jarcento.

Mi fieras dediĉi mian tutan vivon al tiel nobla tasko, pardonante sincere mokojn kaj fidirojn, kaj ĉiutage donacante al nia movado plian peceton de mia mio.

Mi klopodas, ke mia laboro estu kiel eble pli objektiva; mi deziras la centralizon de la ĝeneralaj laboroj, precipe por doni al venontaj generacioj tiujn kunfratigajn kvalitojn, kiuj mankas al la nunaj.

Esperanto estas la rimedo!

Per Esperanto ni venkos. Ekde la unuagrada instruo, ni devos prepari la korojn. Nur sana kunfratiĝo povos fundamenti veran pacon. Tia kunfratiĝo nur povos elveni de nia Esperanto, la internacia ligilo.

Multon mi estas skribinta pri la preparo al tiu tasko., per la antaŭpreparo de sindonaj kaj kompetentaj geinstruistoj de la16 gramatikaj reguloj kaj de la esperantisma karaktero de nia Esperanto. Nur post la efika eduko de multnombraj profesoroj, ni povos proponi la oficialigon de la lingvo.

Tiamaniere la grundo fariĝos malmola, la paŝoj pli firmaj, la ideo pli atentiga kaj respektinda. La elementa instruado de la helpa Esperanto estos la plej grava morala kaj sociala parto de nia movado. Kompreneble, Esperanto apartenas al ĉiuj, disvolviĝos en ĉiaj medioj, progresos en ĉiaj sektoroj, sed, oficialigita de la registaroj, nur eniros en la normalajn aŭ instruistpreparajn lernejojn unue, kaj en la infanajn poste.

En milita atmosfero oni ne povas krei pacon. Ĉio, ekster tio ĉi, estas artifikaĵoj, kiuj ne kongruas kun esperantismo kaj homamo, nia civila kaj paca kulturo.

SALDANHA CARREIRA - Lisboa

La Sociedad Esperantista del Uruguay, adherida a la Organización de Instituciones No-gubernamentales de las Naciones Unidas, se ha dirigido a la Sub-Comisión de Prensa de la ONU, en exposición de uno de los mayores obstáculos para la información de noticias entre los pueblos; el cual es la enorme diversidad lingüística. Y manifiesta la Sociedad Uruguaya de Esperanto:

El grave problema de la diversidad de lenguas está en vías de solución ya que, desde hace más de sesenta años, existe un idioma superior, fácil y neutral, el Esperanto, que ya es una lengua viva, que ha demostrado en todos los órdenes de la actividad humana (congresos universales, literatura, prensa, radio, ciencia, enseñanza, comercio, turismo, viajes, etc.) ser un instrumento insuperable para las relaciones internacionales, puesto que es el único idioma que reúne los postulados exigibles a una lengua para ser internacional, a saber:

1.º—El Esperanto, por su fundamento lógico e internacional, es un idioma fácil de aprender para todos los pueblos.

2.º—El Esperanto es neutral y, por tanto, ningún pueblo, al aprenderlo, puede sentirse menoscabado o herido en su amor patrio. El Esperanto, pues, coloca a todos los hombres en un mismo plano de igualdad lingüística.

3.º—El Esperanto es un idioma superior, que posee las buenas cualidades de las lenguas nacionales más evolucionadas y, por tener una base científica está libre de los defectos de éstas. Es el idioma de la actual civilización.

Por tanto, para que el grave problema de las barreras del lenguaje sea resuelto completamente, sólo se necesita el apoyo y la colaboración de los Gobiernos en la difusión del instrumento adecuado para la intercompresión universal. Este instrumento, ya existente, es el Esperanto. Su adopción y propagación por las Naciones Unidas constituirá un formidable avance en el camino de la paz y de la civilización en los tiempos actuales.

VICTOR LUIS CAO
Secretario

MANUEL FERNANDEZ MENENDEZ
Presidente

LA VIVO NE HALTAS...

La vivo estas konstanta ŝanĝo. La apero de ĉiu estaĵo postulos siatempe ĝian malaperon. Propagandistoj kaj adeptoj de kiu ajn idealismo devas zorgi pri preparo de kapablaj anstataŭantoj, kiuj puŝos antaŭen la dorlotatan doktrinon kaj reviglios la ardan flamon.

Tiel devas agi, ĉie, la esperantistoj; ilia ĉefa tasko devas esti la instrua. Sukoplena maturiĝo sen preta burĝona sekvontigo estas anonco de nepra mortonteco.

Tial, hispanaj esperantistoj zorgas plej dorlote pri starigo de kursoj por komencantoj kaj progresantoj.

Ni scias pri la regula kaj mirinda kostanteco de la aragonaj samideanoj, kiuj, en Zaragozo, ritme bakas junajn fortigontojn de nia afero. Ni konscias pri la daŭra laboro de la Tarrasa grupo, kie nia ĉiam juna Chaler aldonas novajn tavolojn al la grundo de sia samideana idaro. Barcelonanoj revekiĝas pli kaj pli. Ĉe Teksista Sindikato, oni rikoltas novan verdan foliaron. En Madrido mem, bedaŭrinde tiom longe dormetanta, la klopodoj de López Herrero kaj aliaj junaj samideanoj, baldaŭ havigos al ni novajn ĝojajn sciigojn. En Valencio, jam finiĝis, plensukcese, la kurso majstre gvidata de Dr.º Lloréns, kaj tuj poste, Dr.º Tudela reprenis novan taskon kaj instruas novan lernantaron. Eĉ oni preparas, jam, specialan someran kurson.

Sed, ĉio estas pala, kompare kun la sukcesego de la porinstrua tasko en Cheste. Nia afero estas, tie, sur tre bone ŝmirita vojo; tie funkcias tri kursoj samtempe, kaj ne estas pliaj lernantoj, ĉar mankas loko por akcepti ilin! Fido kaj volo faras verajn miraklojn, kaj, tiurilate, nia mondkonata samideano Máñez estas nesuperabla gvidanto.

La bona semo, do, estas disĵetita sur bona grundo. Obeante al la Majstra strofo, ni semas kaj semas konstante... neniam laciĝas!

Libros recibidos

A. B. C. Libro. — Prezo: 4 respondkuponoj. Eldonita de «The Esperanto Publishing Company, Ltd.» (Heronsgate-RICKMANSWORT-Herts. Anglujo)

En el mes de marzo tuvimos el agrado de atender como huéspedes, entre otros, a los señores Lanoux, de la ciudad francesa de Aclés, cuyas hijas mellizas, de diez años, usan el Esperanto como segunda lengua de su hogar.

Hace tan sólo unos días pasó por Valencia el señor Wilkins, en ruta hacia Casablanca, quien, hablando de sus impresiones, manifestaba la gran emoción que experimentó durante su visita al señor Morariu, en Suecia, cuando vió tomar parte en la conversación general, en correcto y fluído Esperanto, a una niña de corta edad, hija de dicho señor.

También el señor Lapenna narra sus impresiones de viaje a través de Francia, preparando el próximo XXXV Congreso Universal, y manifiesta la frecuencia con que suele encontrar niños hablando el Esperanto como segundo lenguaje en pleno ambiente familiar.

Ante este hecho que se da en muchos países, es muy lógica la aparición del librito «A. B. C.», que reseñamos; pues el Esperanto, en su evolución de enraizamiento, ya ha superado la etapa de aprenderlo y conocerlo los adultos, para ser idioma de niños en su hogar.

Por otra parte, el librito está presentado en el plan, eminentemente pedagógico, de conjugar el dibujo, para una más rápida comprensión, con el verso; ofreciendo la mayor amenidad e interés al niño, a quien va destinada la publicación y que, según se indica, de su buena aceptación por parte de todos los padres esperantistas, resultará ser el indicio de una serie para la infancia.

LECIONERO

Ne ĉiam akuzativo estas tiel simpla, kiel tiu en *mi manĝas panon, vi skribas leteron, ni rigardas* ŝin. Sed, ĉar per ekzemploj klarigo estas pli facila. efika kaj rapida, jen: dum leciono, profesoro konsideras *lernantojn* kiel *lernantojn*, kaj li konsideras *sin* kiel *profesoron*. En la klaso, dum la leciono, la profesoro konsideras la *lernantojn* kiel *profesoro*, kaj la lernantoj respektas *lin* kiel *lernantoj*. Poste, profesoro kaj lernantoj konsideras *sin* reciproke kiel *amikoj* kaj kiel *amikojn*.

DELFI DALMAU - Barcelono

☆ LA LERNEJO

CONSULTORIO LINGÜISTICO

L. M. en BETERA.— Aunque las preposiciones en Esperanto, en general tiene cada una su particular significado, algunas de ellas tienen varias acepciones, ya que el autor no tuvo más remedio que hacerlo así, porque de otra forma habría tenido que crear un número bastante mayor de preposiciones. Tal sucede con la preposición **en,** que tiene las siguientes acepciones: Indica el lugar dentro del cual alguien o algo está: **La knabo ludis en la korto.** El tiempo en que ocurre la acción: **En la venonta jaro mi vizitos Italion.** Circunstancia en la que se produce la acción: **Paroli en bona maniero.** El estado final de algo que cambia: **La milito kondukis en multajn mizerojn.**

A. G. en LLOSA DE RANES.— Celebramos le haya gustado la novela que le hemos proporcionado. A continuación me complazco en indicarle el significado de las palabras que no ha encontrado V. en su diccionario: **Gargojlo,** gárgola. **Prelego,** disertación. **Hurli,** aullar. **Splito,** astilla. **Parvenuo** advenedizo.

J. BOSCH

PARA NUESTRO BOLETIN

6.ª lista de donativos (JUNIO 1950)

Suma anterior	**592**	**Ptas.**
P. Félix de Valois Arana (Bata)	**10**	»
Antonio Pont (Valencia)	**5**	»
Vicente Hernández (Sabadell)	**5**	»
José Gil (París)	**30**	»
J. M. García (Valencia)	**25**	»
Urbano Gómez (Santander)	**15**	»
F. Azorín (Madrid)	**3**	»
V. Fraga (Tarrasa)	**3**	»
J. Saladrigas (Badalona)	**7**	»
R. Arnelas (Santander)	**2**	»
E. Solórzano (Santander)	**2**	»
F. Amorós (Valencia)	**10**	»
Victoriana Bueno (Zaragoza)	**10**	»
María Casasnovas (Zaragoza)	**10**	»
Total	**729**	»

En este breve resumen del primer semestre, procede decir algunas palabras: Es verdaderamente alentador apreciar el esfuerzo y la buena voluntad demostrada en esta aportación que agradecemos cumplidamente y sin la cual sería imposible la publicación de los números extraordinarios de doce páginas. Sin embargo, el aumento de las tarifas de estampación es una constante amenaza de déficit para los últimos números del año. Conjuremos entre todos el peligro y que no quede por vosotros, como no quedará por nosotros, el tener que dar ni un solo paso atrás.

EL TESORERO,

Francisco Roglá

ANONCETOJ

Ni akceptas anoncetojn kiuj rilatos al nia afero. Unu peseto au unu r-k. validas por du vortoj. Tri mallongigaj literoj valoras kiel unu vorto. Aparta tarifo por specialaj anoncoj.

J. VIGO MESTRE.—«El Barato», Martinet de Cerdaña (L é r i d a), deziras korespondi kun fremdaj samideanoj pri arto kaj moroj.

JOSE NAVARRO. Calle Llull, n.º 208, 4.º, 1.ª, Barcelona, deziras koresp. kun la tuta mondo pri ĉiuj temoj.

DR. E. TUDELA.—Ruzafa, 43. Valencia. Dez. koresp. kun ĉiulandanoj pri div. temoj. Respondo garantiata.

ANTONIO PASTOR. Ercilla, 49, 5.º, Bilbao (Hispanio). Dez. interŝ, il. pkt. eksterlande. Certa respondo.

RAFAEL VIZCAINO. C. Maluquer, 5, pral. 8.ª Valencia. Dez. interŝ, p. m. kun ĉiuj landoj. Serioza propono.

Agrupación Excursionista «TIERRA Y MAR» Esperanto-Sekcio. Virgen de la Salud, 2 SABADELL (Barcelona). Dez. korespondi kun ekskursemaj asocioj.

AMIKO LEGANTO!.—Memoru, ke ni bezonas vian opinion kaj viajn sugestojn. Mallongaj artikoletoj estas tre plezure akceptataj por oportuna publikigo.

La mejor manera de favorecer al Esperanto en España es inscribiéndose en HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

Socio de número ...	12	ptas. anuales
Socio abonado.. ...	25	» »
Socio protector... ...	50	» »

Las dos últimas categorías dan derecho a la recepción de nuestro Boletín.

Los socios protectores recibirán DOS ejemplares. Los nuevos miembros recibirán todos los números que se hayan publicado anteriormente durante el año